Horizon-TAAL

januaro - februaro 2018 Jaargang 50 - nummer 289





www.esperanto.be

Met steun van de Vlaamse Gemeenschap

INHOUD

Tweemaandelijks tijdschrift, uitgegeven door de Vlaamse Esperantobond v.z.w.
50ste jaargang - januari - februari 2018
Verschijnt de 1ste van elke oneven maand
Overname van artikelen is vrij op voorwaarde dat de bron wordt vermeld en een exemplaar aan de redactie wordt gestuurd

Redactie en administratie: Vlaamse Esperantobond v.z.w. - Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen - tel.: 03 / 234 34 00 - Epost: horizon.taal@esperanto.be
webstek: http://www.esperanto.be/fel/nl

Abonnementen: 30,00 EURO

Rekeningen: t.n.v. Vlaamse Esperantobond, Antwerpen
KBC IBAN BE31 4025 5105 3155, BIC: KREDBEBB
de Post IBAN BE66 0000 2653 3843, BIC: BPOTBEB1

Redactie: Piet Glorieux (piet.glorieux@gmail.com)

Tekstopmaak: Eriko D'Hondt (eriko@telenet.be)

Clubactiviteiten: Katja Lödör (lodorkatja@skynet.be)

Medewerkers: Marc Cuffez, Kevin De Laet , Petro De Smedt, Ivo Durwael, Piet Glorieux, Cyreen Knockaert, Katja Lödör, Kris Panis, Yves Nevelsteen, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, André Ruysschaert, Mireille Storms, Emiel Van Damme, Lode van de Velde, Dan Van Herpe, Ivo Vercammen e.a.

Verantwoordelijke uitgever: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen, Belgio


TEN GELEIDE

Taaldiversiteit. Soms denk ik dat we Esperanto te ‘krampachtig’ verdedigen tegen de ‘verderfelijke’ invloed van het Engels. Misschien moeten we meer de ‘stille’ strategie gebruiken, d.w.z. Esperanto op een natuurlijke manier gebruiken samen met andere talen.
Dit kwam bij me op toen ik merkte dat in het bedrijf waar ik werk, samen met Franstalige en zelfs Indische collega’s, er vlot wordt geswitcht van de ene taal naar de andere, van het Engels naar het Frans, soms naar het Spaans, in mindere mate naar het Nederlands en een enkele keer zelfs naar het Esperanto met een collega die de taal genegen is. Misschien is dit een utopie, maar op die manier, lijkt me, zou Esperanto vanzelf ‘bovendrijven als goed bruikbare taal’. In elk geval lijkt het me dat een te krampachtig verzet tegen één taal contraproductief is.
Esperanto moet een taal zoals een andere worden. De organisatoren van Hungaromania en voorheen het Lingva Festivalo hebben dit al jaren ingezien. Lees meer over de versie van Hungaromania en andere dergelijke interessante initiatieven in dit nummer.


Piet Glorieux

INVITOJ

Zondag 25 februari 2018
Hungaromania in Leuven met ook Esperanto in de hoofdrol.
Alle Esperantogebruikers en -sympathisanten daarheen.
Lees meer op pg. 7
en schrijf u nu al in via hungaromania.eu



Esperanto leren in je eigen tempo in een mooie omgeving in Nederland
Kom dan naar het ESPERANTO Studieweekend van 16 tot 18 maart 2018
in Bornerbroek (Midden-Nederland)
Meer info op pg. 4



Ni invitas vin al la Beneluksa Kongreso
de la 14-a ĝis la 16-a de septembro 2018 en “De Bosberg”, Houthalen, Belgio
Informoj kaj aliĝo: www.esperanto.be/BeneluksaKongreso

Esperanto in 12 dagen

Nederlandse cursus
met oefeningen en oplossingen

De snelste cursus voor de basiskennis

- Gebruikt de belangrijkste 500 woorden
- Zonder inloggen: eenvoudig op Start klikken
- Geoptimaliseerd voor smartphones
- Niet alleen gratis, maar ook vrij bruikbaar in andere projecten

De cursus bestaat uit 12 lessen, met in elke les

- een leestekst
- commentaar over de grammatica
- 3 oefeningen

Daarna kan je het belangrijkste verstaan en zinnen vormen om je elementair uit te drukken en verstaanbaar te maken. Test het uit! : https://learn.esperanto.com/nl/



ESPERANTO Studieweekend

Voor wie Als je nog nooit Esperanto hebt geleerd, of jouw Esperanto is nog niet zo goed als je zou willen, dan ben je van harte welkom. Er wordt op verschillende niveaus les gegeven. De nadruk ligt op het oefenen van het spreken in Esperanto in kleine groepen.

Wanneer Het volgende studieweekend vindt plaats op 16, 17 en 18 maart 2018.

Waar Natuurvriendenhuis Krikkenhaar, Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornerbroek.

De kosten voor dit studieweekend bedragen € 75,- pp. (leden van Esperanto Nederland en NEJ € 65,- pp.) In de prijs zijn inbegrepen: lessen, het overige programma, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee tussen de lessen.

De deelnemersbijdrage van deze bijeenkomst is laag. We willen iedereen een kans geven om deel te nemen. Wil je een extra financiële bijdrage leveren, geef dan aan op het aanmeldingsformulier met wat voor bedrag je de bijeenkomst wil steunen. Elke bijdrage is welkom.

Meer informatie en het aanmeldingsformulier op de website van Esperanto Nederland staan:
http://esperanto-nederland.nl/ned/studieweekend.php



PRI FRUSTRIĜO KAJ MALĜOJO

Iras duope feliĉo kaj tristo de la espero

Okazis la transiro de nia antverpena grupo de Frankrijklei al Lange Beeldekensstraat. Kaŭze aŭ sekve de tio, incidentetoj hazardis antaŭ la sensoj de vido kaj aŭdo de kelkaj el ni. Tiaj malagrablaĵoj konfirmas kaj eble revivigas travivaĵojn de multaj esperantistoj.

De kelka tempo mi volas elskribi certajn pensojn, sed forŝovis tiun ideon, ĉar estas delikate esprimi ilin. Nun, traleginte la lastan **Horizon-taal**'on de la jaro, mi sentis instigon efektive ekverki ion; jam pro jenaj vortoj en recenzo pri teatraĵo, kiun spektis nia aktiva redaktoro Piet Glorieux (paĝo 12). Ili temas pri espero kaj malespero:

"Er is gedrevenheid maar ook misschien soms verbittering." Kaj aliloke: "Hoogstens is er bij sommigen (onder ons) frustratie omdat de verspreiding van Esperanto niet snel genoeg gaat... maar het beïnvloedt onze levenskwaliteit niet meteen."

Tamen, tiom da elrevigoj frapas ĉe nia pordo kaj je nia koro. Pro kio tiuj seniluziiĝoj?

Pro tio ke la parolo, ankaŭ ĉi tie, estas pri volontuloj. Kaj volontuloj estas homoj, ĉiu kun siaj propraj interesoj, kapabloj, intenco, opinio aŭ prefero, persona situacio kaj vivo. Kun aŭ sen iniciatoj. Fojfoje la fortostreĉoj superas la forton. Iam la fortoj estas for, elĉerpitaj. Malhelpoj interŝoviĝas, la tempo pasas, ŝancoj forglitas. Kiel ajn, KUNLABORI restas malfacile, ĉiam estas malfacila. Silentaj singultoj soras, la ploroj ne aŭdeblas. Jes, ni alte tenas la standardon. Ĝis subite io krevas en sino, emocioj eksplodas, malkonsento iĝas kverelo, disputo, malkontento. Iuj fuĝas, malaperas. Ne la ĝisostaj, tiuj nur ĉagreniĝas. Ia fona tristeco penetras en ilin.
La movado muelas, ĝisostaj samideanoj sin elvringas. Spirpaŭzo sekvas spirpaŭzojn. Sed paŭzo ne sufiĉas aŭ eĉ paŭzeto ne venas.

Esperantistoj, kvazaŭ proverbe, estas homoj de bona volo, sed bonvolemo tra entuziasmo, komplezoj kaj cedoj kondukas al plendmotivoj, ĉikanoj, nekontenteco, indigno, ĉagreniĝoj. Bonvolaj homoj pretas asisti, helpi, konsili, plani, kunlabori, sed iafoje ne samidee. Diversaj kapabloj kaj talentoj povas atingi multon. Tamen inteligento havas plurajn aspektojn: racio, logiko, sagaceco. Kaj ofte ĝi prezentas sin nur ruze. Ne ĉiam intence, evidente.

Facilas fanfarone kaj fantazie paroli pri trovo de amikoj tutmonde. Sed ĉehejme kontaktoj kaj kunlaboro montriĝas kelkfoje malpli facilaj. Foje ili finiĝas fiaske. Kiel longa krevo en granda spegulo. Ĉiuokaze onidiroj ĉiukaze viglas. Malgraŭ streboj, multa penado, sindediĉoj kaj belaj sindonoj. En formo de malemo, kritikoj, grumbloj: ni transloĝiĝis de ĥaoso en ĥaoson; ŝajne nenio funkcias kiel antaŭe; saviĝis nia sidejo, sed ial mankas 'salto antaŭen'. Eble kvinjaroplanoj elfariĝos en daŭro de dek jaroj. Aŭdiĝas ankaŭ pozitivaj sonoj: pri la vastaj montrofenestroj, pri la situo inter multaj kulturoj.

Ni spertis kaj scias, ke la daŭremo de nia movado apogas sin sur volontuleco, senĉesa volontulado. Neniam intervenas kontraktoj, striktaj devigoj. Ĉio baziĝas sur interkonsentoj, promesoj, lozaj paroloj; ĉe neplenumo pretekstoj havas la kutimon regule kliŝe kaj ŝablone ripetiĝi. Do estas afero de fido, espero kaj amo. Jen febla ĉenero. Ni perdis jam multajn simpatiantojn, eĉ efektivajn samideanojn, pro la konstanta premo de volontula tasko. Vera solvo ne ekzistas. Sed eble ni emas tro facile konsideri ĉiujn spontaneajn helpon, laboron, servon, kontribuon, kaj fidelon memkomprenebla; kaj aŭtomate dumviva? Oni engaĝiĝas senprofite, pro ĝisosteco, por la afero, pro dependeco de la lingvo: evidente sekvas seniluziiĝoj. Kiom da elrevigitoj restas, fine?

Mi pensas pri niaj rangoj, en ĉiu nivelo. La morto forfalĉis en la lastaj du jaroj nombron da eminentaj movadanoj. La tempo sin eternigas. Sed ni, la batalantoj, estas oferitaj. Ni malaperas. Vidu, kiom da gravuloj forfalis nelge: Lucija Borĉic (1921-2015), Ignat Bociort (1924-2015), Jerzy Uspienski 1928-2015), Manuel Halvelik (1925-2016), Endre Dudich (1934-2016), Detlev Blanke (1941-2016), Paul Gubbins (1949-2016), Reinhard Haupenthal (1945-2016), Edwin Burg (1925-2006), Lina Gabrielli (1930-2016), Zbigniev Galor (1952-2017), Franz-Georg Rössler (1949-2017), André Albault (1923-2017), Marjorie Boulton (1924-2017), Mikaelo Giŝpling (1924-2017). Sed apud jenaj eminentuloj ankaŭ ordinaraj movadanoj estas siaspecaj granduloj. Kompreneble ili estas same malhaveblaj.

Ni estas la portantoj de solvo, ĉiuj el ni: ĉar ni ja havas bonan solvon de la lingva problemo en monda komunikado. Ni konstante pruvas tion. Eĉ inter ni, loke. Ni,

en Antverpeno, per helpo de ne-Antverpenanoj, finfine havas 'propran' domon. Sed gardi ĝin, teni ĝin en ordo, estas daŭra zorgo. Sendube, apud oficejo por la Ligo, ejo por klubaj aranĝoj kaj kunvenoj estas ne nur utila, sed bezonata. Tamen ni konstatas, ke bona komunikado dependas pli de spirito, de animoj kaj situacioj, ol de iloj. Same pri kunlaboro. Ĉu la komunikado inter ni, ajnalingve, glatas?

Homoj interdependas. Estas domaĝa fakto, fenomeno ne rara, ke multaj vivolonge ĝisostaj esperantistoj sentas bedaŭrojn pri sia tutviva entuziasma engaĝiĝo. Ja sentoj estas neeviteble jen kaj jen vunditaj. Oni feliĉe ofte savas sin per iom da sinmoko kaj relativigo. Famas en nia movado fortaj karakteroj. Preterfulmas Moerbeek. Kaj...

Kara Emile Van Damme, iel kolego. Mi admiras vian diligenton, vian laboremon en granda aĝo. Kiel fajne vi insistas pri licenco de 'sunbanantoj'. Kiel senlime, per frazoj kaj proverboj, ekspluatas apartajn vortojn en dumonata rubriko poezia kaj lingvostuda. Belan kolekton vi faris, tra jaroj ĉerpante el poemaroj kaj gazetoj, okaze eĉ freŝaĵon el Beletra Almanako. Kiel insiste kaj entuziasme vi enlumigas la vivantecon de arto en nia 'senkultura' lingvo. Mi tre *aprecis* kaj treege *aprezas* cian kontribuon. Gratulojn!

Paŭla vidis min skribanta, notanta sur paperslipojn, tajpanta; dum kelkaj jaroj, ĉiutage. Ja tio estas mia vivo: legado kaj verkado. Mi finis la lastan libron en 2016; intencis, esperis ke ĝi estu eldonita en 2017. Iuj (el la leganta homspeco) demandas min, kiam ĝi aperos. Kion respondi? Klare, tiel ne okazos ĉi-jare.
- Je hebt hier zo lang zitten schrijven. En daar ligt je boek nu. Gebeurt er iets mee? ŝi diras. Jes, Paŭla brulas prizorgi la interesojn de aliaj. Sed ne, ĉi tiu estas perdita jaro.
En vendredoj en kiuj ŝi – volonte – deĵoras ĉe la bufedo, la kluba vespero eltiriĝas kaj la perbicikla reiro hejmen prokrastiĝas.
- 't Is al donker (mia malantaŭa lumo ne funkcias). Ben je nog lang bezig? mi demandas ŝin.
- Ik moet de kas sluiten, maar kan de rekening niet maken, controleren. Nog niet iedereen heeft betaald.
Jen problemo solvita per antaŭpagitaj kuponoj. Sed iuj vesperoj plu trenas tedan voston.

Dume mi pensas pri iu truo en surbreta librovico (tia breĉo kiu sin mem fermas per forgeso post kelka tempo). Pensoj saltas iom ĉene, de ĉenero al ĉenero. Interalie pri amiko Manuel. Mi konstatas kio estas, postmorte, la sorto de tutviva laboro: ĉiuj flege faritaj dosieroj kun tekstoj kaj desegnaĵoj estas sepultitaj en arĥiva kesto (ĉerkeca kvankam ne ĉerkoforma) – granda kartona skatolo – konservata, provizore en la kelo de iu membro. Mi provis resumi liajn verkojn en mia romano «Kvin kverkoj kaj la sekvo». Ankaŭ tiu en forgesejo. Jen kaj jen iu demandas pri ĝi. Ne, ankoraŭ ne eldonita. Kiam...? Mi sentas, ke ankoregaŭ ne, kaj respondas laŭe, svage. Se mi scius antaŭe, mi estus sendinta la tekston al la Novjorka eldonejo de BA, la Beletra Almanako. Sed kial mi komplikus la aferojn per tia distanco?

Ha, la literaturo. Miaj libroŝrankoj. Miaj bretaroj. Mi aĉetas librojn kaj abonas gazetojn. Kaj kolektas ĉion. Jam pli ol sesdek jarojn da esperantisteco. Mi legas en sep lingvoj. Sed jen, la kal-dornoj, doloraj lokoj, ne sidas ĉe mi sur la piedoj, ne sur plandoj aŭ fingroj. Ili sidas sur miaj libroj. Pruntedonitaj romanoj ne revenas el si mem. Necesas repeti ilin; kion neniu ŝatas, poste forgesas. Kiam mi ĉesis instrui la vesperkurson (post 27 jaroj), la lernejestrino farigis por mi (la unusolan) elpresaĵon de lernoplano por la tri studojaroj deEsperanto. Mi estis kompilinta ĝin pro postulo de la ministerio. Ĝi enhavis – sufiĉe detale – ĉiujn malfacilaĵojn de la esperanta gramatiko. Dufoje mi ĝin lasis el la manoj al kolego, kiu kopiis la tuton por si. La unuan fojon mi rericevis ĝin, difektita pro la kopiada proceduro; la duan fojon ĝi ne reatingis min, venunte de la sama kolegino (kiu jam devis posedi kopion). Do definitive perdita. Postrestas nostalgia kaj 'faka' vundo. Mallojalaĵoj povas okazi. Mi registras tion sen rankoro.

Ni vivas en stranga mondo. Dum propraj libroj vagas eksterdome, mi stokas hejme stakojn da vendotaj nevenditaj libroj kiuj ne trovas spacon en la nova kontorejo.

Ĉi tiuj impresoj ne similu al premsonĝoj; ellasis mi sole kelkajn pasajn pripensaĵojn.

Christian Declerck

HUNGAROMANIA, ZONDAG 25 FEBRUARI 2018

Zondag 25 februari 2018: Hungaromania in Leuven met Esperanto ook in de hoofdrol. Alle Esperantogebruikers en -sympathisanten daarheen. Lees hieronder en schrijf nu al in via hungaromania.eu

Het Talenfestival in Leuven was welbekend; het vond vier keer met succes plaats tussen 2008 en 2013. Omdat het publiek niet groeide, besloot Esperanto 3000 de reeks niet voort te zetten in dezelfde formule. In 2016 werd het HungaroMania, eerder gericht op Hongaars met Esperanto in een bijrol.

Het enorme succes, met wel 350 deelnemers, deed ons uitkijken naar een nog grootser vervolg. Daarvoor wijken we uit naar de prachtige omgeving van het Heilig-Hartinstituut, vlak bij het station van Heverlee (Leuven).

Op 25 februari 2018 nodigen we ook alle Esperantosprekers uit: voor jullie is er een eigen programmaspoor, in en over Esperanto!
Topspreker is István Ertl, een Hongaar die momenteel in Luxemburg woont en werkt als vertaler bij de Europese Rekenkamer. Jarenlang was hij redacteur van het tijdschrift *Esperanto* van de Universele Esperanto-Vereniging. Op HungaroMania heeft hij het in Esperanto over “Sándor Szathmári, een Hongaarse Orwell?”.
Yves Nevelsteen, ook welbekend van onder meer E@I, stelt in het Nederlands én Esperanto app’s voor smartphone of pc voor rond taal en communicatie. Sandra Schenkel, leraar wiskunde en Esperanto, geeft een introductie in Esperanto aan Nederlandstaligen. Omgekeerd belicht Marc Vanden Bempt in Esperanto de eigenheden van de Hongaarse taal in vergelijking met Esperanto.

Op die manier tonen we aan al wie in de Benelux Hongaars spreekt of interesse heeft voor het Hongaars en Hongarije, dat Esperanto bestaat en leeft. Ook op de webstek staat het op gelijke voet met Nederlands en Hongaars. Je zal het ook tegenkomen in het welkomstwoord, in boeken te koop aangeboden op de Hongaarse markt en op een informatiepaneel. Om dit echt tot een succes te maken rekenen we op massale deelname van de hele Belgische Esperanto-wereld.

La festo okaze de la Semajno de Internacia Amikeco en Loveno estis bone konata: ĝi okazis de 1979 seninterrompe ĝis 2008 kaj la tuta belga Esperanto-movado ĉeestis. En 2008 tio iĝis la Lingva Festivalo, sukcese okazinta kvarfoje inter 2008 kaj 2013, kiu ankaŭ celis publikon ekster la Esperanto-movado. Pro tio ke tiu publiko restis senkreska, Esperanto 3000 decidis ne daŭrigi la serion laŭ la sama formato. En 2016 anstataŭigis ĝin HungaroMania, celata al la hungara, kun tiam nur kromrolo por Esperanto.

La grandega sukceso, kun eĉ 350 partoprenantoj, igis nin prikonsideri pli grandiozan daŭrigon kun pli ol 500 partoprenantoj. Tial ni iros al la belega ĉirkaŭaĵo de la Heilig-Hartinstituto, tre proksime al la stacidomo de Heverlee (Leuven).
Dimanĉon, la 25-an de februaro 2018 Esperanto denove havos ĉefrolon: apud la hungara kreiĝis plena propra programspuro en kaj pri Esperanto! Tio ĉi denove estas la festo por la Semajno de Internacia Amikeco. Ni do invitas ĉiujn Esperanto-parolantojn!
La ĉefpreleganto estos István Ertl, hungaro nun loĝanta en Luksemburgo, tradukisto ĉe la Eŭropa Revizora Kortumo. Dum jaroj li redaktis la revuon *Esperanto* de la Universala Esperanto-Asocio. En HungaroMania li esperantlingve sin demandas “Sándor Szathmári: ĉu hungara Orwell?”. Yves Nevelsteen, konata de interalie E@I, dulingve prezentos saĝtelefonaj aŭ etkomputilajn aplikaĵojn rilatajn al lingvo kaj renkontiĝoj. Sandra Schenkel, instruistino pri matematiko kaj Esperanto, enkondukos Esperanton al nederlandlingvanoj. Inverse Marc Vanden Bempt prilumos en Esperanto la specifajn ecojn de la hungara lingvo kompare al Esperanto.
Tiel ni pruvas al ĉiu kiu en la Benelukso parolas la hungaron aŭ interesiĝas pri la hungara aŭ Hungario, ke Esperanto ekzistas kaj vivadas. Ankaŭ en la retejo ĝi samnivele rolas kun la nederlanda kaj la hungara. Vi renkontos ĝin en la bonvenigo, en libroj proponataj al vendo en la merkato, en la dika programbroŝuro kaj en informpaneloj. Por tion igi vere sukcesa, ni kalkulas je amasa partoprenado de la tuta belga Esperanto-movado.

In Leuven en Aalst kan je cursussen Hongaars volgen, daarom organiseren de lesgeefster *Hedwig Gerits* en student *Siegfried Mertens* mee het evenement. Ook de directeur *István Csonta* van het Collegium Hungaricum Leuven organiseert mee. Voor het Esperantoluik staat *Marc Vanden Bempt* in.
We genieten de steun en medewerking niet alleen van de stad Leuven, maar ook van het Hongaarse Culturele Balassi Instituut, de Hongaarse ambassade in België, de Hongaarse school en het tijdschrift Most Magyarul! , de KU Leuven en van vele plaatselijke medewerkers en studenten Hongaars. Samen brengen ze Hungaro-Mania tot leven.
De tweede pijler is opgebouwd rond de Hongaarse cultuur. Als hoofdact staat het Hongaarse muziekensemble Agri Music Factory van de Hongaarse Eszterházy Károly Universiteit op het programma. Ze spelen nummers van Hongaarse "evergreen-bands" als LGT, Hungária, KFT en Omega. Het optreden van deze groep is een primeur voor de Benelux! 's Avonds organiseren we een echte Hongaarse táncház of dansavond. Onder leiding van geoefende dansers kan iedereen een Hongaars pasje wagen. Vooraf is er een Hongaars concert met verschillende instrumenten.
De Hongaarse cultuur bestaat uit meer dan zingen en dansen. De Hongaarse keuken vormt eveneens een belangrijk onderdeel. De deelnemers kunnen 's avonds dan ook genieten van een (inbegrepen) Hongaars
We genieten de steun en medewerking niet alleen van de stad Leuven, maar ook van het Hongaarse Culturele Balassi Instituut, de Hongaarse ambassade in België, de Hongaarse school en het tijdschrift *Most Magyarul!*[4] , de KU Leuven en van vele plaatselijke medewerkers en studenten Hongaars. Samen brengen ze Hungaro-Mania tot leven.
Op HungaroMania staan de Hongaarse taal en cultuur centraal. Het programma kan je vinden op de webstek www.hungaromania.eu. Het erg volledige programma van de dag is opgebouwd volgens drie belangrijke pijlers. De eerste wordt gevormd door de taalsessies over Esperanto en het Hongaars. Ook de Hongaarse poëzie en ruimere literatuur komen aan bod.

En Loveno[1] kaj Alsto[2] eblas partopreni kursojn pri la hungara, tial la tiea instruistino *Hedwig Gerits* kaj studento *Siegfried Mertens* kunorganizas la eventon. Ankaŭ la direktoro *István Csonta* de la Collegium Hungaricum[3] Leuven kunorganizas. La Esperanto-flankon prizorgas *Marc Vanden Bempt*.
Subtenas la eventon kaj iel kunlaboras ne nur la urbo Leuven, sed ankaŭ la hungara kultura Balassi Instituto, la hungara ambasadejo en Belgio, la hungara lernejo kaj la revuo *Most Magyarul!*[4], la KU Leuven kaj multaj lokaj kunlaborantoj kaj kursanoj pri la hungara. Kune ili vivigos HungaroMania'n.
En HungaroMania la hungaraj lingvo kaj kulturo estas la fokusa enhava centro. La programon vi trovas en la retejo www.hungaromania.eu. La riĉega programo de la tago enhavas tri gravajn pilierojn. La unua piliero enhavas la prilingvajn sesiojn pri Esperanto kaj la hungara. Ankaŭ la hungara poezio kaj pli larĝe ĝia literaturo ĉeestos.
La dua piliero prezentas la hungaran kulturon. Ĉefa ero en la programo estas la muzika ensemblo Agri Music Factory de la hungara Universitato Eszterházy Károly. Ili ludos ĉiamŝatatan muzikon de hungaraj grupoj kiel LGT, Hung´ria, KFT kaj Omega. La prezentado de ĉi tiu dekpersona ensemblo estas premiero por la Benelukso! Vespere ni organizos veran hungaran *táncház* aŭ dancadon. Spertaj dancistoj gvidos nin tra niaj unuaj hungaraj dancpaŝoj. Antaŭ tio okazos hungara koncerto kun diversaj instrumentoj.
La hungara kulturo enhavas pli ol kantado kaj dancado. Ankaŭ la hungara kuirejo estas grava ĝia ero. La partoprenantoj vespere ĝuos hungaran vespermanĝon (inkluzivan en la kotizo): vi malkovros kio estas lecsó (legu: leĉo). La tutan tagon ankaŭ funkcios trinkbudo, kie hungara vino, biero, pomsuko kaj manĝetoj haveblos je bela prezeto. Posttagmeze vi jam povos elprovi viajn kuirkapablojn preparante "töltött tojás" (plenigitajn ovojn) kaj "kókuszgolyó" (kokosglobojn) kaj viajn danckapablojn antaŭprovante kelkajn popoldancojn. Tiuj programeroj ankaŭ celas infanojn. Plue la hungaraj naturo, filmo, historio, klasika muziko kaj multe pli pliplenigas la programon. Tiun vi trovas detale en nia retejo.

Webstek: www.hungaromania.eu/nl

Adreso: Heilig-Hartinstituut Heverlee, Naamsesteenweg 355 te Leuven (Heverlee)

ESPERANTO - LOKE

De derde pijler bestaat uit de permanente activiteiten. Je vindt er een minimarkt, waarop vertegenwoordigers van Hongaarse producten het publiek met hun specialiteiten laten kennismaken. Er is een tentoonstelling over Hongarije, en de Hongaarse taal en Esperanto worden er kort voorgesteld. De deelnemers kunnen deelnemen aan een quiz waarin ze een tiental vragen krijgen waarop je het antwoord alleen ter plaatse kan vinden.

Je kan je nu inschrijven via de webstek hungaromania.eu. Voorinschrijven is aangewezen: tot half februari kost het 12 euro (en je bent zeker van je plaatsje), ter plaatse betaal je 15 euro. Kinderen (tot 12 jaar) krijgen een vermindering van 50%. Dit bedrag kan je overschrijven op de rekening (iban) BE97 7350 4021 2649 (bic) KREDBEBB op naam van HungaroMania.
ja kan overtuigen een bezoekje te brengen aan ons evenement!
István Csonta, Hedwig Gerits, Siegfried Mertens, Marc Vanden Bempt (Esperanto 3000 vzw Leuven).

[1] www.clt.be/CLTSite/index.php?contentid=123&ta=0
[2] ww.leerwatjewil.be/nl/cursus-hongaars-leren-262.htm
[3] www.leuven-collegium-hungaricum.hu
[4] www.mostmagyarul.nl + www.hongaarsconcert.nl

Apud la hungarajn lingvon kaj kulturon ni volas prezenti niajn eminentajn gastojn. La hungara ambasadoro en Belgio, Nagy Zoltán, jam konfirmis sian ĉeeston, kun prelego. Ankaŭ ĉeestos Luc Sels, la rektoro de la KU Leuven.

La tria piliero konsistas el la tuttagaj aktivecoj. Funkcios minimerkato, kie reprezentantoj de hungaraj produktoj konatigos siajn specialaĵojn al la publiko. Aldone viziteblos ekspozicio pri Hungario, la hungara lingvo kaj Esperanto. Vi povos partopreni en kvizo solvenda per la informoj haveblaj surloke. lingvo kaj Esperanto. Vi povos partopreni en kvizo solvenda per la informoj haveblaj surloke.

Eblas aliĝi jam nun pere de la retejo hungaromania.eu. Konsilindas antaŭaliĝi: ĝis la duono de februaro kostas 12€ (kaj vi certos pri via loko), poste aŭ surloke oni pagas 15€. Infanoj (ĝis 12-jaraj) havas 50%-an rabaton. La kotizon eblas ĝiri al la konto (iban) BE97 7350 4021 2649 (bic) KREDBEBB je la nomo de HungaroMania.

Ni esperas ke tiu ĉi ege interesa kaj plenplena programo konvinkos vin partopreni en nia evento!
István Csonta, Hedwig Gerits, Marc Vanden Bempt (Esperanto 3000 vzw Leuven)




BONVENON
ÜDVÖZLÜNK

HUNGAROMANIA

Ĉiu kun pasio por Hungario kaj/aŭ la hungara: BONVENON/ÜDVÖZLÜNK

KIO? Tago en kiu Hungario kaj la hungara lingvo centras.

KIAM? Dimanĉon la 25-an de februaro 2018
Pordoj: 10a horo - starto: 10.30

KIE? Heilig-Hartinstituut
Naamsesteenweg 355, 3001 Heverlee

ENIRO antaŭpage: € 12
surloke: € 15

Plia info:
www.hungaromania.eu

Kunlaboras la urbo Loveno kaj


Balassi Instituut
Culturele Dienst van de Ambassade van Hongarije in Brussel

RED HET NEDERLANDS

In het dagblad *Trouw* van 3 augustus 2017 publiceerde masterstudent David van Overbeek een opiniestuk over het Nederlandse taalbeleid in het hoger onderwijs, zoals dit tot uiting komt in een recente studie van de KNAW (Koninklijke Nederlandse Academie van Wetenschappen) die besteld was door de minister.

In het stukje van onze student economie & filosofie (mooie combinatie van vakken!) lees ik tussen de regels door dat het noeste werk van de geleerde commissie nu ook weer niet zó wetenschappelijk is als wat het schijnt.

Het is algemeen bekend dat de universiteiten veel geld behoeven om te kunnen functioneren. Daar kan natuurlijk niemand een verwijt over maken. Integendeel, geen zinnig mens betwijfelt dat investeren in wetenschap een van de beste dingen is die men kan doen. Binnen het huidige universitaire kader halen de universiteiten méér geld binnen door méér buitenlandse studenten aan te trekken. Het mechanisme werd geschapen… en het werkt, helaas, té goed. De manier waarop je aan geld komt, is niet zonder gevolgen. De maatschappij, de democratie, zou zich moeten laten horen, bedenk ik dan zelf. Of kan het niemand wat schelen dat we onze taal en onze ziel aan de duivel verkopen?

Te veel “rendementsdenken”, stelt van Overbeek, te weinig aandacht voor de hoofdtaak van goed onderwijs. Dit is concreet merkbaar in toenemend massaonderwijs. Je zou het wat oneerbiedig kunnen vergelijken met de tendensen in de landbouw sinds vele decennia. Hierin past ook de snelle opmars en totale hegemonie van het Engels als academische taal. Hoe kan het, vraagt van Overbeek, dat de KNAW zo weinig de financiële mechanismen belicht, die er de oorzaak van zijn dat de universiteiten hun kerntaken niet meer naar behoren kunnen vervullen.

Maar er is een tweede lacune in de studie. De KNAW onderschat deerlijk de essentiële rol van taal, en van taalvaardigheid. Je zou van geleerde koppen méér grondigheid verwachten. Uit eigen ondervinding weet onze kritische student maar al te goed hoe groot het verschil is tussen colleges economie in het Engels, en een Nederlandstalige filosofieopleiding. Het gebruik van de eigen taal bevordert het enthousiasme voor de studie, voor de discussie, voor het vak, kortom… voor de wetenschap. Iedere student heeft recht op die inspirerende ervaring, ook die van een vak als economie. De KNAW schijnt niet de waarde van taal te kennen. *How to lie with statistics?* Of: hoe kan je liegen met wetenschappelijk lijkende rapporten?

Cyreen Knockaert





Henri Paul Vatré (1908-1998), Franco, esperantisto de 1927. Li oficis dum du jaroj en la biblioteko de UEA en Ĝenevo. Kontribuis al diversaj revuoj.

PROVENCAJ FERINOTOJ

Fuĝantajn sentojn
singulte mi mitralis
per la tajpilo:
Sur kampo neĝkovrita
nur dek ses vortoj falis.
Veturo nokta
inter tenebrodigoj.
Mi blinde fluas
al kiuj plaĝoj lumaj?
Al kiuj elrevigoj?
Sunbanantinoj
el delikata ledo
sin ŝmiroleas
dum posttagmezoj pezaj
de seneskapa tedo.
Sublumbaj sferoj,
mamgloboj ekplanedas
ĉe la sunbrilo.
Ĉu la virinoj eble
vizaĝon ne posedas?

Vakantienota's uit de Provence

Vluchtende gevoelens
mitrailleerde ik hikkend
met de schrijfmachine:
Op het besneeuwde veld
vielen slechts zestien woorden.
Nachtelijk rijden
tussen dijken van duisternis.
Ik vloei blindelings
naar welke stralende stranden?
Naar welke ontgoochelingen?
Zonnebaadsters
met delicate huid (leder)
smeren zich in met olie
gedurende zware namiddagen
van niet te ontvluchten verveling.
De bollen onder de lendenen,
de borstrondingen beginnen te zweven als planeten
in de zonneschijn.
Hebben de vrouwen misschien
geen gelaat?

***Averto°:** Por faciligi la lernadon kaj la ekzercadon de la lingvo multaj frazoj estas prezentataj en du aŭ pluraj partoj kaj multe pli da vortoj ol antaŭe estas tradukitaj. Espereble tiu didaktika aspekto ne tro nervozigos veteranajn spertulojn° de la lingvo.*

waarschuwing; ervarenen

PRI LA POEMO

<u>**La titolo.**</u> **Provencaj ferinotoj**

provenca

Ne konfuzenda: **provinco/provenca**:

provinca rilatas al iu... provinco de iu lando;
provenca rilatas al... sud-orienta parto de Francio, la **Provenco**.

Rilate al tiu Provenco oni ofte parolas pri kiuj aferoj?

la **vetero**: la bona **provenca klimato,**
la **lingvo**: la tipa **provenca akĉento** de la lokaj parolantoj; la lavendaj° kampoj. *lavendel*

ferinotoj =?

notoj pri la ferioj.

Kial plej ofte **konsilindas**° fari notojn ? *is het aan te raden*

Ĉar° alie° oni riskas ne plu rememori° detalojn pri la sperto°. Ferinotoj do por... **ĝui**° la rememorigon°. *want; anders / zich herinneren / ervaring / genieten; herinnering*

Alivorte: daŭre minacas la **forgesemo**° ! *Anders gezegd: voortdurend dreigt de vergetelheid*

(Interkrampe°: minacas eĉ tiom°, ke oni ofte ne plu retrovas sian notlibreton°!). *tussen haakjes / zelfs zozeer / notitieboekje*

Kiam tiaj ferinotoj povas ankaŭ esti interesaj?

Eble por **fanfaroni**° post la ferioj pri ili**?** Do por montri al aliuloj (fiere aŭ ne) siajn iamajn° travivaĵojn°. *opscheppen / van ooit; belevenissen*

Persona demando: ĉu vi, kara legant(in)o, kutimas skribi kaj konservi **ferinotojn**? Aŭ ĉu vi konsideras tion kiel tempo-...

malŝparadon°, tempoperdon? *tijdverspilling; -verlies*

En kia formo tiaj ferinotoj estas ofte **konservataj**?

Laŭplaĉe° ĉu en skriba formo, ĉu kiel° fotoj, ĉu kiel° filmo, ĉu ankoraŭ kiel blogo. *naar believen / hetzij als... hetzij als*

(Jen ĉio ĉi kiel° bela sugesto por la legantoj !) *dit alles als*

Ĉu ĉiuj feriantoj reagus sammaniere?

Plej verŝajne° jes ! *hoogst waarschijnlijk*

Verso 1. Fuĝantajn sentojn
Kio estas la malo de **fuĝanta** sento?
konstanta, daŭra sento, eble ankaŭ:
impon(eg)a°. *imponerend*
Pli precize temas° ĉi tie pri kiaj sentoj? *gaat over*
Ĉu ni scias pri kiuj sentoj li parolas?
Nur tio ne estas klara.

Versoj 2-3. singulte mi mitralis per la tajpilo:
Kial li agas **singulte**?
Ne klara en ĉi tiu kunteksto. Eble li estas ege kortuŝita°. *geëmotioneerd*
Ĉu tio tamen ne estas iom **troiga**°? *overdreven*
Post pripenso, eble jen tipa reago de...
emociplena° poeto. *vol emotie, zeer ontroerde*
mitrali = ?
uzi maŝinpafilon°. *machinegeweer, mitrailleur*
Notu: 'singulte' iom harmonias kun 'mitralas' pro la ripeta sono.
tajpilo° angla vorto ('to type') *type- of schrijfmachine*
Kial simpla tajpilo povas sugesti ideon de mitralado?
Pro la rapideco kaj la bruo° de la tajpado. *geluid*
Eble ankaŭ pro la nervozeco de la aŭtoro, kiu volas skribi siajn sentojn sur papero?

Verso 4. sur kampo neĝkovrita
Verŝajne temas pri kiu sezono?
la vintro. Pro tio li komparas la blankan paperon kun neĝkovrita kampo.

Verso 5. nur dek ses vortoj falis.
Kial 'nur'?
La poeto ŝajnas seniluziigita°. *teleurgesteld*
Kiuj vortoj?
Kial nur 16? Kial tia silento?
Eble la emocioj ne lasas sin facile kapti° *vangen* per vortoj.

Versoj 6-7. Veturo nokta inter tenebrodigoj.
digoj de tenebro? Kie la aŭtoro estas fakte?
Li estas tute ĉirkaŭata de mallumo, de tenebro. Li do certe ne estas en dense priloĝata° regiono. *bewoond*
La vojo similas al rivero inter digoj.
Kiuj loĝantoj de niaj nordaj landoj ŝatas kutime **veturi**° suden? (suden= al la sudo). *rijden*
La **feriantoj**° de niaj landoj. *vakantiegangers*
Oni facile povas **diveni**° kial ! *raden*
(Interkrampe: oni povas iri suden aŭ... norden, okcidenten, orienten).

Versoj 8-9. Mi blinde fluas al kiuj plaĝoj lumaj?
Kial **blinde**?
Laŭlitere li vidas nenion, ĉar li vojaĝas nokte.
Figurasence li eble tre bone konas la vojon.
Kial li '**fluas**'?
La veturado ege facilas. Laŭ la uzitaj vortoj li komparas sin mem al rivero.
Rimarku la diferencon inter la nokta tenebro kaj la luma vojaĝcelo. Laŭ lia demando oni povas supozi, ke en tiaj malbonaj vojaĝkondiĉoj li jam revas pri sia alveno° en la sudo. *aankomst*

Verso 10. Al kiuj elrevigoj?
elrevigo=?
Io, kio igas vin eliri el ia revo.
Kio povas esti tiuj elrevigoj?
Io ajn, kio povas kaŭzi° la finon de *veroorzaken* ies° revo. *iemands*
Kial li vojaĝus al tiaj elrevigoj?
Li certe faras tiun vojaĝon intence°. *opzettelijk*
Ĉar la skribo ne eblas, la pensoj devojiĝas° al la nokta ekskurso. *afdwalen*
Certe iu inter la legantoj iam° spertis tian *ooit* elrevigan momenton !
Tamen povas elrevigo kelkfoje havi bonan influon sur la revinton° ?... *gedroomd hebbende*
Ĝi certe povas eviti postajn surprizojn.

Versoj 11-13. Sunbanantinoj el delikata ledo sin ŝmiroleas
Jen surpriza ŝanĝo en la etoso°! *stemming*
Oni komprenu, ke la vojaĝanto jam veturis dum... multe da kilometroj, dum pli ol la tuta nokto.
sunbanantinoj = poeta licenco por **sunbaniĝantinoj** ('bani' kaj 'sunumi' estas transitivaj)
virinoj kiuj baniĝas en la sunlumo, kiuj kuŝas en la suno por bruniĝi°. *bruin worden*
NB: sunamantinoj amas la sunon,
sunumantinoj° amas sunumi. *zonnende dames*
ledo
ledo estas fakte laŭvortare: felo senharigita, tanita° kaj preparita por la homa uzado. *gelooid*

Kial la poeto parolas pri **ledo** kaj ne simple pri **haŭto**?
Eble aŭ certe kun iom humura nuanco?
sin ŝmiroleas = ?
sin ŝmiras per oleo.
Ni ĉiuj bone scias, kial ili faras tion:
Ili volas eviti la bone konatan **sunbruligon**°. *zonnebrand*
Kion oni krome° uzu por **prizorgi** sunbruligon? *bovendien*
Tiucele° oni uzu ian **kremon** kaj por la okuloj ankaŭ ian **sunŝirmilon**° aŭ **sunokulvitrojn**° *daarvoor (voor dat doel)* *zonneklep; -bril*
Kial tamen iuj hezitas uzi tiajn okulvitrojn?
Por eviti°, ke la palpebroj° restu tro blankaj. *vermijden; oogleden*
Interkrampe: ĉu tiuj/tiaj personoj havus la tiom timatan° elreviĝon el verso 10? *gevreesde*
Verŝajne multaj legant(in)oj streĉos° la orelon ! *lett: spannen, de oren spitsen*
Kroma demando: ĉu en tiu ĉarma mondo de la poemo, estas neniu viro?
Demandu la poeton !

__Versoj 14-15.__ dum posttagmezoj pezaj de seneskapa tedo.

Kial tiuj posttagmezoj estus **pezaj**?
Pro la varmo kiu multe kreskas kaj eble pro la digesto° post la manĝo? Aŭ pro la enuo° ? *vertering* *verveling*
Kial tie regas° tia **tedo**? *heersen*
Verŝajne pro la fakto, ke nenio estas farenda°! *te doen*
NB: Ĉu ĉiuj tiel reagus kaze de tiaj posttagmezoj?

__Verso 16.__ Sublumbaj sferoj,

Kie estas la **lumboj**°? *lenden*
en la malsupra parto de la dorso kaj ambaŭflanke°. *aan beide kanten*
sublumbaj sferoj
Jen belega priskribo por kiu speciala parto de la korpo?
por la postaĵo°. *achterwerk*
Kial la poeto ne simple parolus pri ies postaĵo?
Eble tiu vorto sonas iom tro banale, eĉ iom triviale°. *grof, vulgair*
Oni kelkfoje aŭdas pri la **pinĉado**° de la virinaj sublumboj? *knijpen*
Fi° al vi ! Kia **malkonvena**° ago° ! *foei; ongepast*
(sed verdire° por iuj ege **tenta**°). *por diri la veron* *verleidelijk*

__Versoj 17-18.__ mamgloboj ekplanedas ĉe la sunbrilo.

globo =?
sferforma objekto (kp. terglobo)
ekplanedas =?
Ili komencas *(ek-)* moviĝi kiel planedoj.
Kial la postaĵo kaj la mamoj ne estas kalmaj?
Ili povas esti kalmaj, sed la tuta atento° estas altirata° de la rondaj virinaj formoj. Por la aŭtoro ili ŝajnas esti la sola, kio ankoraŭ ekzistas. *aandacht; aangetrokken*

__Versoj 19-20.__ Ĉu la virinoj eble vizaĝon ne posedas?

Kion pensi pri tiu stranga demando de la poeto?
Ĉu li ne ŝajnas aŭ ŝajnigas° iom kritiki sin mem? Cetere°, ni ĉiuj bone scias kiel homoj, kaj certe viroj, tiakaze reagas! *(doet zich) schijnen* *trouwens*

__Konkludo pri la poemo.__

Jen tre agrabla vojaĝo de iu el la neĝkovrita Eŭropo kaj en la noktaj horoj, por iri al la suniluminata sudo, la fama Provenco.
Certe tie ĉio ĉarmas lin, sed precipe°, kiel antaŭvideble°, la sunumiĝantinoj. *vooral* *zoals te voorzien*

PLIE PRI KELKAJ UZITAJ VORTOJ

__Pri sento__ (verso 1)

sento = ? *gevoel*
agrable aŭ malagrable konsciata° sensaĵo, fizika (ekz. varma sento, kaŭzita de la suno) aŭ psika (ekz. varma ama sento). *bewust geworden*
senti = ? *voelen*
ricevi sensaĵon, pertuŝan° aŭ internan, kiu aperas en nia konscio kun impreso de doloro aŭ plezuro. *door aanraking*
Ekz.: Pluvis, sed li ne sentis la malsekon; mi ne plu sentas miajn piedojn pro frostiĝo°; vi sentas ĝojon lernante Esperanton. *vervriezen*
sentema° = ? *(psychisch) gevoelig*
havanta facile impreseblajn sentojn.
Ĉu vi, kara legant(in)o, estas sentema por la ĉarmoj de la alia sekso?
Ĉu vi krome estas **tiklo-sentema**°? *kittelachtig*
Aliflanke, kiajn filmojn oni malkonsilu° al **sentemuloj**? *afraden*

perfortajn° filmojn. *geweldddadig*
sentiva° *(fysiek) gevoelig*
tia, ke ĝi reagas al eksteraj fizikaj cirkonstancoj
Ekz.: sentiva haŭto, sentiva pesilo° *weegschaal*
Ĉu ĉiu havas **orelon** sentivan por la muziko?
sentiveco° = ? *gevoeligheid*
propreco° de ĉelo° aŭ *eigenschap; cel*
ĉelaro° reagi al eksteraj aŭ *organisch weefsel*
internaj ekscitoj° *prikkeling*
Ni ĉiuj konas la sentivecon de nia **nerva** sistemo. Ankaŭ en la **fotografio** oni parolas pri la sentiveco de la filmo.
Oni ne malofte aŭdas homojn diri, ke ili antaŭsentis ian malfacilaĵon, problemon ktp.
Ĉu oni kredu tian **antaŭsentivecon**?

Jen kelkaj Zamenhofaĵoj.

1) **Se okulo ne sentas, dorso eksentas.**
Lett.: Als het oog niet voelt, dan begint de rug te voelen.
Oni komprenu ke se oni ne bone rigardas, tiam...?
Oni povas fali aŭ io povas fali sur ion.
Figurasence?
Malatentuloj ricevas sur la dorson la konsekvencojn°, ili riskas *gevolgen*
sperti° malagrablaĵojn. *ondervinden*

2) **De fremda dento ni doloron ne sentas.**
Lett.: Van een vreemde tand voelen we de pijn niet.
Figurasence: Problemoj de aliaj homoj ne kortuŝas° nin. *be-, ontroert*

3) **Ĉiu vivas laŭ sia... prudento kaj sento.**
Iedereen leeft volgens zijn verstand en gevoel.
Ĉu tio ĉiam veras?
Kiam tia banala konstato dirindus°? *zou waard zijn te zeggen*
Kaze de surprizo° pri ies° *verbazing; iemands*
singarda° sinteno°. *voorzichtig; houding*
Ĉu tiaj homoj estas malaprobindaj°? *af te keuren*
Certe ne! Tiaj ne estas necese° *noodzakelijk* egoistoj.

4) **Kion koro sentas,... lango prezentas.**
Lett.: Wat het hart voelt, biedt de tong aan.
(Waar het hart van vol is, loopt de mond van over.)
Oni ĝenerale emas° paroli pri siaj *geneigd zijn* sentoj kaj delikataj personaj problemoj. Sed kelkaj tamen ne. Pri ĉi-lastaj oni povus diri, ke ili estas... silentemaj°. *zwijgzaam*

